MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

4

Aprilo 2025 Kol. 477/41

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Poemo Aprilo, Finkalkulo, Praktika instruado ĉe la Universitato de PA, Bestoj – droguloj, Dorlotbestoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Aprilo

Paspluvoj gajaj de printempo
kaj la unua dia ĉielarko super la pejzaĝo!
Formetis mastro la semtukon
kaj konfideme li ĉirkaŭiris grundon,
kiun li prisemis.
Verŝajne venos frostoj.
Tamen la semaĵo sankta difekton ne suferos.
Ĉar unusola leĝo estas ĝermi kaj elkreski,
elkreski dum pluvegoj kaj tempestoj,
al ĉio spite.
Prudentaj maljunuloj sin varmigas ĉe kameno,
aŭdiĝas pri antikva kutimar' iliaj
polemikoj kaj pri malnovaj prognostikoj.

Karel Toman – Monatoj,

en Esperanton tradukis Jaroslav Mráz.

Desegnis Zuzanka Pospíšilová



## Finkalkulo de AEH de la jaro 2024 + budĝeto por la jaro 2025

| | budĝeto 2024 | realo 2024 | budĝeto 2025 |
|---|---|---|---|
| **Enspezoj** | | | |
| donacoj | 12 000 | 6 500 | 12 000 |
| membrokotizoj | 21 000 | 14 386 | 20 000 |
| seminarioj | 0 | 0 | 0 |
| ekskursoj | 0 | 0 | 0 |
| **Sume** | **33 000** | **20 886** | **32 000** |
| **Elspezoj** | | | |
| materialo | 4 000 | 4 748 | 4 000 |
| poŝto, telefono, interreto | 23 000 | 28 515 | 25 000 |
| riparoj, servoj | 5 000 | 0 | 2 000 |
| gazetoj, libroj | 0 | 0 | 0 |
| kunvenoj | 500 | 800 | 500 |
| vojaĝelspezoj | 500 | 0 | 500 |
| seminarioj | 0 | 0 | 0 |
| ekskursoj | 0 | 0 | 0 |
| donacoj | 0 | 0 | 0 |
| **Sume** | **33 000** | **34 063** | **32 000** |
| | | | |
| **Enspezoj - elspezoj** | **0** | **-13 177** | **0** |

Petr Angelov p.p.m.
prezidanto de AEH

Ing. Stanislava Nováková p.p.m.
kontistino de AEH

# Praktika instruado ĉe la Universitato de Pardubice

Longtempe mi instruas studentojn de la Universitato de Pardubice (CZ), precipe en la Fakultato de Transporto - Transporta Inĝenierio (ĉeĥe: Dopravní fakulta Jana Pernera) studoobjekton ”Senbariera Transportado” alivorte Transportado por ĉiuj. Krom aliaj aferoj mi prelegas pri la kondiĉoj kaj rimedoj por vojaĝado de rulseĝuloj, malbonvidantoj, malbonaŭdantoj kaj aliaj personoj kun ajnaj limigoj de mov- aŭ orienteblecoj. Post la fino de instruperiodo la studentoj plenumas mallongan enketilon kun taksado de enhavo kaj kuro de la studobjekto. Ili povas taksi la plej interesan (malinteresan) parton de la studobjekto ktp. Kaj la rezultoj?



Kiel la plej interesaj partoj de la kurso estas taksitaj praktikaj seminarioj dum kiuj gestudentoj memservas sidante en rulseĝo, iras tra koridoro, en / el lifto; ekstere ili provas iri sur la glata, ebena tereno, en deklivo, trans la ŝoseo ktp. En alia seminario ili iras kaj orientiĝas blindigite kun blanka bastono – unue kun akompananto, poste memstare, laŭlonge de la randŝtono, tra la pasejo por piedirantoj, ŝtupare ktp. Ili provas orientiĝi ankaŭ laŭ akustikaj signaloj. Poste ni komune diskutadas kaj evaluadas impresojn kaj spertojn el ambaŭ seminarioj.

Ĉiuj tiuj aktivaĵoj servas por akiri ”travivaĵojn” en situoj, kiujn travivas ĉiutage rulseĝuloj, blinduloj k.a. homoj kun limigita mov- aŭ orientebleco. Mi esperas, ke post tiuj seminarioj la studentoj pli bone komprenos bezonojn de tiuj homoj kaj en siaj venontaj laborpostenoj ili povos pli bone aranĝi kondiĉojn por uzado de publika transporto.

Jaroslav Matuška

# Bestoj – droguloj

Efikojn de kuracherboj kaj fungoj ni konas ofte nur danke al bestaj droguloj, kiujn niaj prauloj kopiis. La naturan narkotan drogon uzas "distre" diversaj mamuloj kaj senvertebraj insektoj. Do, kiuj mutaj estaĵoj plej ofte estas volonte en narkota stato kaj kiu bestospecio eble klarigis la misterajn vizitojn el la kosmo? Laŭdire, en afrika Abisenio la paŝtisto Kaldi rimarkis, ke lia kapraro strange mekas kaj saltas, kiam ili paŝtiĝas ĉe arbustoj kun ruĝaj beroj. Paŝistoj komencis prilabori ilin kaj tial pli poste sur nia tablo aperis kafo. Liaj kolegoj en Korno de Afriko rimarkis senbridajn reakciojn de agrokulturaj bestoj, kiuj formanĝis foliojn de ĉato (Catha edulis). Ĝiajn ŝosojn pro ĉatino, alkaloido simila al amfetamino, maĉas en Jemeno landidoj ĝis nun. Kaj ankaŭ montaraj gvidistoj en Andoj sciis jam antaŭ kelkaj jarcentoj, ke lamoj, kiuj maĉas foliojn de kokao, estas pli viglaj kaj povas porti pli da ŝarĝo.
Pumoj en Peruo dum sanproblemoj mordetas arboŝelon, nomata kinkono. Tiel aperis ĥinino kiel medikamento por batalo kun malario.
Simile eklernis la nordamerikaj indianoj kuraci eksterajn traŭmojn. Ili observis, ke cervoj frotis siajn surfacajn vundojn per rezino de arboj, kaj trovis tiel ĝiajn antisepsajn efikojn.

Aborigenoj de Aŭstralio rimarkis, ke kiam en profundajn akvojn alfalis certa tipo de folioj, fiŝoj en narkoteco alnaĝis al akvosurfaco. La aborigenoj unue aplikadis la foliojn kiel ĉasan dormigaĵon, pli poste el ĝi generis anestezilon.
Aproj en nuntempaj Gabono kaj Kongo el grundo eligas kaj voras radikon de arbusto ibogao kaj poste en paniko flankensaltadis antaŭ nevideblaj spiritoj. Same timekscite reagas ankaŭ hundoj kaj katoj kaj ŝatas ĝin apliki en sia menuo ankaŭ histrikoj kaj goriloj. Ŝamanoj poste faris el tiu radiko komponanton de religiaj ceremonioj, ĉar ĝia substanco ibogaino kaŭzis ĉe homoj kelkhorajn sonĝajn statojn.
Grandkorna ŝafo pro sia ŝatata halucinogeno en formo de flavoverdaj likenoj ne riskas nur mortigan falon el muroj taŭgaj por ĉamoj, sed dum skrapmordetado de ŝtonoj kun likenaj restaĵoj ĝi multfoje frotdifektas sian dentaron ĝis karno. Laboristino de flava formiko, kiu vivas subtere kaj apartenas al la plej multnombra specio de rustkoloraj formikoj, ne kapablas rezisti, kiam al ĝi parazita skarabo ocipo, kiel transdonanto, ofertas trankviligan substancon el fino de sia stariĝinta postaĵeto. "Aromo aŭ gusto devas al laboristino efiki kiel drogo, ĉar post mallonga gustumo forportos ĝin en amniajn ĉelojn, kie la entrudiĝinto ĝuas poste paradizajn tempojn." Kiam la formika laboristino lasas sin subaĉeti per drogo kaj en sia flatlogiĝo enlasos sian "liveranton" en la formikejon, ĝi endanĝerigas la tutan kolonion.
"Malrespondece" kondutas ankaŭ afrikaj simioj, kiuj post kiam ili formanĝis



Edvard 8-jara

magiajn fungojn, ĉesis zorgi pri siaj idetoj, aŭ devojiĝas ekster de sia bando. El batalo por pluekzistado eliminiĝas abeloj, kiuj estis troigintaj kun flora nektaro kaj en droga dormemo eksponas sin al birdoj kiel ilia nutraĵo. Aliflanke, kantobirdoj ŝatas fermentitajn fruktojn, sub kies influo forte puŝas kontraŭ barierojn. Grupoj de junaj delfenoj longanazaj, kiuj vivas ĉe bordoj de Sud-Afriko, lekas kaj singarde remaĉas globfiŝon. Tamen, ne interesas ilin ĝia viando, sed ili utiligas ĝiajn defendajn refleksojn, dum kiuj la fiŝo pufiĝas kaj ekskrecias kredeble la plej toksan substancon de nia planedo. La delfenoj narkotiĝas per ĝia veneno, kiel tion faras fumantoj de mariĥuano. Poste en narkotiĝo ili kontente rigardas siajn bildojn sur la marsurfaco.

Lemuroj nigraj, kiuj vivas en Madagaskaro kaj tie nutras sin nur per fruktoj, "ekmordas" la lokajn centpiedulojn kaj iliajn venenan sekrecion ili enfrotas en sian hararon kiel insekticido. Tiu ilin venigas en staton de feliĉego, kiel fumanto de cigaredoj. Boacoj en Siberio konsumas muskariojn. Ĉi tia boaco poste ĉirkaŭvagas, nekutime muĝas kaj skuas la kapon.

Neokulfrapa, proksimume sesdek centimetrojn alta pereno kun korformaj folioj kaj blankaj aŭ bluaj floretoj havas eble en ĉiu eŭropa lingvo botanikan nomon kunigita kun kato: en Slovakio oni nomas ĝin *kocúrnik*, en Germanio *Katzenminze*, angle *catnip* kaj en la ĉeĥa lingvo *šanta kočičí* (en ĉiuj tiuj ĉi lingvoj la signifo de la popola nomo estas katario aŭ katherbo). Ĝi sekrecias halucinogenon, kiun katoj tre volonte inhalas, deŝiras ĝiajn folietojn kaj karesas sin per ili, mordetas ilin; poste ili rulas sin, skuas la kapojn, tremas sin, ternas kaj saltas. Tio kutime daŭras de kvin ĝis dek minutoj.

En Tasmanio, kie kreskas pli ol duono de mondproduktado de papavo pro produktado de sanigiloj kiel morfino, kodeino kaj

aliaj analgezikoj, trovadis farmantoj misterajn ringojn de detruitaj terfruktoj, pri kiuj ili opiniis, ke tion faris vizitantojn el kosmo. Sed, oni konstatis, ke tion faris grupoj de pli malgrandaj kanguruoj, kiuj pro nematuraj papavkapetoj tramordis truojn en barilo kaj sur sia dancbankedo la saltetantaj morfinistoj piedbatigis en la papavo rondojn.

Kelkaj bestspecioj konsumas alkaloidojn pro propra sindefendo. Ekzemple, en Bohemio fluganta nokta papilio arktio bruna voregas kiel raŭpo ankaŭ vegetaĵaron de kanabo kultiva, kiu enhavas kanabinoidojn. Tio estas strategio, per kiu ĝi gardas sin mem antaŭ noktaj predantoj, kiel estas vespertoj. Al tiuj plie akustika finto antaŭe anoncas sian defendadon: "Atento, mi estas toksita. Tio estis nur kelkaj komparoj pri konduto de bestoj kompare al konduto de homoj.

El la magazino Téma (Temo) tradukis E.P. kaj Fejfi.

## DORLOTBESTOJ
## Dank' al inundo oni ekvartis testudojn



Inter la bestoj, sendube, la hundo okupas la unuan lokon en la koro de homo. Oni kutimas diri, ke ĝi estas lia plej bona amiko.

Tamen, ankaŭ aliaj hejmbestoj, ekzemple katoj, ĉevaloj, fiŝoj, birdetoj, kunikloj, papagoj, ktp., estas indaj pri la amo de siaj posedantoj. Antaŭ kelkaj monatoj mi spektis per televido, interesan raporton:

En iu urbeto, norde de la subŝtato San Paŭlo, okazis pluvego. Pro tio pligrandiĝis la fluego de la rivereto, kiu trapasas la urbon.

Fiŝoj kaj testudidoj loĝigis sin en la fluejo de tiu rivereto. Loĝantoj de la loko kaptis tiujn malgrandajn bestojn, kaj ĝis hodiaŭ, bredas ilin en malgrandaj akvarioj.

Kiam la testudidoj kreskas, ili estas kondukitaj al pligrandaj akvarioj. La infanoj plej ŝatas ĉi tiujn dolortbestojn. La urbo, siavice, fariĝis fama pro ĉi tiuj okazaĵoj.

Verkis Liette Lêla
Reviziis Célio Freitas Martins



Gajan Paskon, belan printempon kaj bonan sanon kun ĝojo kaj paco deziras al vi Mirka kaj Ludmila

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.